

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 76 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 oktobro 1926

PERTINENT QUESTIONS.

How many people know Esperanto? Why do they learn it? Do they make use of it? What becomes of all the people who learn Esperanto? These are some of the questions often asked by esperantists and non-esperantists.

Let us substitute the word French or German for Esperanto and endeavour to answer the questions. We know as a fact that thousands of students in schools, universities and colleges, and many isolated students throughout Australasia are learning French. What becomes of them? Why do they learn it? Do they make use of it? How many people know French?

Apparently they vanish into obscurity. Apparently they learn French because they are expected to do so, because it is "the thing." Judging by the people we meet, the number who know French is infinitesimal. The French tongue is never heard except in the meeting places of the French people themselves. Only very seldom do we meet an Australian who is able to use the language.

Yet because of the learning, there must be thousands of people who are able to correspond, to read, and to speak in French; and because of that ability they most certainly are on a higher plane of mental culture than the individual who is minus the power of a knowledge of an important language. Furthermore, the student is

undoubtedly better equipped for the battle of life. It is only reasonable to suppose that this latter motive actuates most of those who learn the language.

It is a curious commentary on this learning of French that while many people are met who lay claim to a knowledge of the language, perhaps only one in a hundred of these can carry on a conversation or write an ordinary letter, with any degree of accuracy. But this one per cent. is those who realise that the learning is worth while, and use their knowledge for intellectual pleasure as well as for material profit. And the same may be said of any language—including Esperanto.

Of the thousands in Australia who learn Esperanto, many find their way into remote regions in the various states, and the international language becomes to them a source of pleasure and profit. Cut off, in a measure, from social intercourse they are able to correspond and create a circle of friends which may begin in Tokio and continue into every country in the world. Others in cities are able to use Esperanto for commercial purposes. Some learn because it is comparatively a new thing and they wish to be "in" every new proposition. Others because a noble ideal underlies the teaching. Still others, because they are anxious to improve their mental and intellectual outlook. During the last 40 years the study of

Esperanto has been continuous throughout the world, among all classes. Thousands of people, of all colours and creeds, use the language. Governments and the League of Nations have officially recognised it.

It is difficult to conceive of any similar development in the history of mankind in so short a period.

Centuries elapsed before any one national language had attained to anything approaching the position of Esperanto after 40 years from its inception.

AUSTRALIAN GOVERNMENT SANCTIONS ESPERANTO.

Conforming with the decision of the International Telegraphic Convention at Paris last year, the Australian Postal Authorities notify that, as from November 1st, 1926, Esperanto will be accorded all the privileges of a "plain language" for oversea telegraphic messages, writes our Sydney correspondent. Paragraph 396 of the "Postal and Telegraph Regulations" has been amended accordingly, and the public apprised through prominent press notices.

For the present this does not enable Esperanto to be telegraphed at the same favoured rates within the Commonwealth (code charges still applying), but it is hoped to prevail on the Authorities to extend this concession shortly.

Nevertheless, the above decision is one of great importance to Australian Esperantists as it constitutes the first official recognition of the language in Australia.

It is interesting, in this connection, to read through the list of 43 languages admitted as "plain languages" by the International Telegraphic Convention, which embodies all the leading nations of the world. These include almost unknown languages, and prove how relatively unfair it was to exclude Esperanto.

Alphabetically, the languages are as follows:—Albanian, Amaric, Annamite (Quocngu), Arabic, Armenian, Bulgarian, Croatian, Czechoslovakian, Danish, Dutch, English, Estonian, Finnish, Flemish, French, German, Greek, Hebrew, Hungarian (Magyar), Icelandic, Italian, Japanese, Kisuahili, Latin, Lettonian, Lithuanian, Luxemburg, Malay, Malgache, Norwegian, Onolof, Persian, Polish, Portuguese, Roumanian, Ruthenian, Russian, Serbian, Siamese,

Slovene, Spanish (Castilian), Swedish, and Turkish.

EIGHTEENTH UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS.

For weeks past, Esperantists from all parts of the world have been flowing to Edinburgh, the seat of the Eighteenth Universal Esperanto Congress and the Esperanto Summer University, and in all, about a thousand delegates and representatives were gathered together in the "Athens of the North."

Edinburgh is recognised as one of the most beautiful cities of Europe and the Congressists were obviously delighted with the historic town. Not only Europe was represented, but also the Americas, India, Japan, Australasia and Iceland, and, although the Britons were naturally in the majority, all the meetings were thoroughly international in character.

The Local Congress Committee had arranged that Congress members should ride free on the Corporation trams and buses and the joke of the week was the amicable wrangling as to whose turn it was to pay the fares. We fear that in the general hilarity there were many slanderous allusions to the Scottish thrift—a joke which the visitors from abroad were quick to appreciate.

It was with deep regret and sympathy that the members heard of the illness and consequent absence of Dr. Edmond Privat, the President of the International Committee of the Esperanto Movement, and heart-felt good wishes and hopes for an early recovery were sent to him by the Congress.

The Esperanto Summer University is the outcome of an idea conceived some years ago by a few Belgian Educationalists, to bring together in Brussels, during the university vacation, professors and students of all countries in order to enable these to complete and widen their knowledge and to awake among them that international spirit so much needed in the world to-day. For several years there took place in Brussels courses on science, economics, law, statistics, etc., and Esperanto was used there for certain lectures in addition to being discussed as the international auxiliary language for science.

The Esperanto Summer University at Geneva was arranged in agreement

with this International World-University. The second session in Edinburgh is the continuation of this work, by professors and lecturers of various countries who are famous in their respective departments.

The lecturers for the first section—Medicine—were Professor Odo Bujwid of Cracow University, and Dr. Pascal euel, of Leipzig University.

Professor Bujwid lectured on Man and Microbes, dealing with the resistance of the cells of the human organism to microbes and microbic products and the methods of increasing and preserving such resistance.

Many interesting lantern slides were shown. These were for the most part made in the Institute of Hygiene in Cracow by the lecturer himself, some came from the State Institute of Hygiene in Warsaw.

Dr. Deuel dealt with the Successes of Modern Treatment of Phthisis, laying emphasis on the fact that this disease is not hereditary as was once supposed. He discussed and explained the leading modern methods and was hopeful about the future of the treatment of this disease.

His second lecture was concerned with The Lengthening of Human Life, in which he pointed out that, thanks to the great progress of modern medical science and to successful prophylactics, we have succeeded in increasing the normal duration of human life in the last century by ten years.

The second section—Physical and Technics—was dealt with by Dr. Fournier d'Albe, of London and Birmingham Universities, Mr. Rinaldo Oren-go, of Torino, and Dr. Alfredo Stromboli, of Pisa.

Dr. Fournier d'Albe lectured on Radio and its Future. Among real possibilities of wireless progress, he mentioned a world clock that would be capable of controlling timepieces everywhere by special signals; wireless locating code signals for the use of aircraft; and television. He expressed the belief that every large transmitting station would be compelled to adopt Esperanto as the auxiliary language.

Mr. Oren-go's lecture dealt with the Sun and Solar Phenomena, with special reference to the spectrum and its use for astronomical research, and sun spots. His lecture was illustrated by some interesting and, in some cases, unique lantern slides.

Dr. Stromboli's theme was Electro-

Metallurgy in Italy and was illustrated by lantern slides.

Linguistic Science—the third section—was presented by Professor W. E. Collinson, of Liverpool University, and Mr. Andreo Che, of Cluj. Professor Collinson lectured on Esperanto as a Road to Linguistic Science and Mr. Che dealt with The Direct Method as applied to the Teaching of Esperanto. He said that the direct method was a way of overcoming some of the difficulties inherent in the national tongues, but was not essential in the teaching of Esperanto, for the grammar of Esperanto was so simple that even a child could understand it. He included in his lectures an exposition of the direct method of teaching Esperanto as he had been compelled to use it in Rumania, owing to the diversity of the languages spoken by his pupils.

There were five lecturers in the fourth section—Folklore—Professor Th. Cart, of Paris University, French Folklore; Dr. Immanuel Olšvanger, of London, Jewish Folklore; Mr. Paul Bennemann, of Leipzig University, German Folklore; Mr. S. Grenkamp-Kornfeld, of Poland, Polish Folklore; and Mr. Jaume Grau Casas, of Barcelona, Catalan Folklore. Most of these lectures also dealt with folk-song and were illustrated by some excellent singing.

The lecturers under the fifth section—International Law—were Professor Pierre Bovet, Principal of the Institut J. J. Rousseau in Geneva (in the absence of Dr. Edmond Privat), and Mr. C. C. Tarelli, of the International Labour Office, Geneva.

The title of Professor Bovet's lecture was The Education of the Child for Peace. He discussed the nature of the child and the importance of natural games and stated that the chief instinct in the child is the social instinct, with its component parts, the herd instinct and the instincts of conformity and solidarity. These instincts, properly trained, are a valuable assurance on behalf of the future peace of the world.

Mr. Tarelli dealt with the history and work of the International Labour Office.

These lectures are of real educative value and there is no doubt that the Esperanto Summer University is the germ of a permanent international university, the eventual influence of which is incalculable.

At the same time, the work, discussions and amusements of the Universal Congress were in progress.

There were meetings of the Language Committee, the International Central Committee of the Esperanto Movement, the Committee of National Representatives and other official institutions of the Esperanto Movement. On Sunday, the 1st August, there was the Divine Service in Esperanto, in St. Giles' Cathedral, and the dedication of the recently issued Esperanto version of the Bible. There were meetings of members of various sectional interests, such as Y.M.C.A., Anti-Smokers, Red Cross, Teachers, Freethinkers, Bahai-ists, etc., etc.

The lighter side of Congress life was not neglected. On Sunday there were various excursions and a concert in the evening. On Monday evening the Congress members were officially accepted by the Mayor and Town Council of Edinburgh. On Tuesday, the 3rd, occurred a special Scottish concert and on the next evening the famous Orpheus Choir sang a selection of Scottish songs. The foreign visitors were especially impressed by the wonderful singing of this choir and many were heard to declare that nowhere in Europe had they heard finer choral singing.

Thursday's excursion to the Firth of Clyde and the Kyles of Bute was perhaps the chief success; everything was perfect; the weather (nearly), the scenery and arrangements. Friday's International Ball was very fine. It is a wonderful experience for dancers to dance and converse with partners from ten or more nationalities.

It was a wonderful Congress, perfectly arranged, in a beautiful city, and the cheery Gls revido en Danzig! was not unmixed with sadness for the end of an unforgettable week.

LA BIBLIO EN ESPERANTO.

De la tempo de la morto de D-ro Zamenhof, antaŭ naŭ jaroj, la esperantistoj pacience atendis la publikigon de la kompleta Malnova Testamento, kiun li tradukis. Diversaj malhelpoj prokrastis la eldonadon. Unue la mondmilito, poste la serĉo por eldonisto kaj por la monrimedoj presigi la verkon kaj ebligi, ke ĝi kostu al la publiko kiel eble plej malmulte. Oni transdonis la manuskripton al brita komitato, kiu sukcesis ne nur trovi eldoniston, sed ankaŭ bon-

koran subtenon, kiu provizis la tutan monon, bezonatan por kompostigi la verkon kaj klišigi la kompostajojn.

La konata British and Foreign Bible Society kun la National Bible Society of Scotland entreprenis la eldonadon, sed kun la kondiĉo, ke la manuskripto estu zorge kontrolata kun la fidinda teksto de la hebrea originalo. Tiun taskon oni konfidis al kompetentaj spertuloj kaj al iuj anoj de la Esperanta Akademio, kiuj povus garantiĝi al la eldonistoj kaj al la publiko la fidelecon kaj fideindecon de la traduko.

Oni povas tuj aserti, ke tiu revizado ne faris ian fundamentan ŝanĝon de iu paragrafo, kiun Zamenhof verkis, kaj la legonto povas certiĝi, ke la traduko estas vere la verko de Zamenhof laŭ lia intenco kaj ideo. Antaŭ sia morto li indikis kelkajn ŝanĝojn, kiujn li volis fari en la jam eldonitaj partoj de la Biblio, kaj la komitato respektis la dezirojn de Zamenhof tiurilate.

Kiam la esperantistoj ricevos la libron, ili aklamos ĝin kiel la gloran kronon de lia vivlaboro. Oni devas esti danka, ke li vivis por kompletigi ĝin, kiel lian lastan heredaĵon al la esperantista popolo, kiun li kreis. Oni ne povas paroli tro laŭde pri ĝi kiel fidinda traduko kaj kiel majstroverko en Esperanto. Estas notinde, ke ĝi estas traduko de hebrea libraro, farita de hebreo konanta detempe de sia juneco la idiomon de la originala teksto. Por la unua fojo post la tradukiĝo de la Malnova Testamento en la grekan lingvon (de la Septuaginto) en la tria jarcento A. K., la Sanktaj Skriboj de la hebreatoj estas tradukita de hebreo en internacian lingvon. La latina Vulgato (eldonita en la kvara jarcento P. K.) ja estis verkita en la internacia lingvo de la tempo, sed tio estis la verko de spertuloj de la roma eklezio.

La graveco de la traduko por Esperanto estos nekalkulebla, ĉar ĝi fariĝas la ĉefa klasikaĵo de la lingvo. La hebreaĵ Sanktaj Skriboj estas la fundamenta literaturo de la pli granda parto de la civilizita mondo. La Biblio ne estas nura libro sed ĝi estas libraro — aro da libroj. La Malnova Testamento estas kolekto de tridek-naŭ libroj. Ilia varieco estas miriga, kiel ajn oni pristudas ilin. Ili ampleksas historion kaj biografion, juron kaj moralajn, filozofion kaj popoldirojn, dramon kaj poezion, profetaĵon kaj psalmon. Ĉiu aparte estas la produk-

taĵo de geniulo kaj el diversaj epokoj; kaj ili venas al ni kiel atesto de la morala, spirita kaj intelekta esprimo de tiuj epokoj. Mil jaroj apartigas Genezon de Malahi. Dum ni pasas de libro al libro, ni povas kalkuli la ŝtupojn de la ŝtuparo, laŭ kiu la homoj grimpis al sia nuna civilizeco. La Biblio estas evolua libro. Ĝi bildas la evoluigon ne nur de la homaro, sed de la homa ideo kaj scio de Dio dum la pasato de la jaroj. En la lumo de tiuj faktoj oni povas kompreni, kiel la Biblio fariĝis la ĉefa libro de preskaŭ ĉiuj lingvoj. Ĉiu ŝpertulo en la angla lingvo devas submetiĝi al la disciplino de la angla traduko de la Biblio. La traduko de D-ro Martin Luther estas fundamenta libro de la germana lingvo. Ĉiu popolo, venanta en la lumon de civilizeco kiel rezulto de moderna misiista klopodo, ricevas la Biblion kiel ĝian unuan literaturon. Ĝi fiksas la lingvaĵon, kaj el ĝi ĉiu alia literaturo ĉerpas sian formon kaj esprimon. Oni do ne povas trograndigi la gravecon de la Esperanta Biblio. Esperantistoj jam konstatis el la jam tradukitaj partoj de la Biblio*) la rimarkindan kapablon de Zamenhof traduki la antikvan tekston en fluan kaj gracian Esperanton. Oni trovas, ke la lingvaĵo de iuj el la lastaj tradukoj rebrilas mirige la stilon, la elokventecon, la fajron kaj la ritmon de la hebrea originalo. Tia fidela traduko estas preskaŭ neebla ĉe iuj el la naciaj lingvoj. Tio efikos multon por konvinki skeptikulojn pri la ebleco esprimi adekvate per Esperanto ĉiujn

variojn de homa penso.

Unu el la kondiĉoj de la eldonado kutime en Britujo estas, ke la Nova Testamento estu bindita kun la Malnova. La traduko de la Nova Testamento ne estas la verko de Zamenhof, sed de komitato, kiu sub la redaktoreco de Pastro John Cyprian Rust el Scham, Cambridge, eldonis la Novan Testamenton antaŭ dektri jaroj pere de la British and Foreign Bible Society kaj la National Bible Society of Scotland. Tamen granda parto de la Malnova Testamento estis tradukita de D-ro Zamenhof, antaŭ ol oni entreprenis la tradukon de la Nova Testamento; kaj la influo de la Malnova troviĝas en la Nova. Plie la revizitoj de la Zamenhova traduko de la Malnova Testamento kaptis la okazon fari kelkajn ŝanĝojn en la traduko de la Nova, por akordigi ĝin kiel eble plej bone kun la Zamenhova verko, precipe ĉe tiuj partoj, kiuj estas citaĵoj el la Malnova.

Zorgemaj legantoj de la Biblio en Esperanto eltrovos en ĝi multon, kiu ne vidiĝis en la nacia traduko. La preskaŭ universala regulo en Esperanto: unu vorto, unu ideo, ebligas, ke la esperanta teksto rivelu ĝuste kaj unusece la signifon de la originalo hebrea aŭ greka. kaj la traduko do fariĝas ne nur rivelado de la originalo, sed ankaŭ komentario. Al tiuj, kiuj havas la devon en la estonteco traduki la Biblion en indiĝenajn dialektojn, la Esperanta Biblio havas apartan valoron; kaj estas eble, ke ĉi povos mem rapide fariĝi la Biblio por tiuj popoloj, en kies lingvo tradu-

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

Tasmanio estas laŭ ĉiu opinio tre bona loko en kiu oni libertempas.

Dum pasko 1927 estos plia alogilo—Esperanto Kongreso.

Venu ni vokas vin.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ko ankoraŭ ne ekzistas ĉar per multe da instruado pri la internacia lingvo Esperanto provizos ŝlosilon al ĝi. En misia laboro, do, la Esperanta Biblio povas okupi gravan lokon.

Oni uzas ĉi tiun okazon, por esprimi la dankon de la esperantistaro al la amikinoj, kies malavareco ebligis la eldonadon, kaj al D-ro Mc. Fadyen, profesoro de hebrea lingvo en la kolegio de la United Free Church, Glasgovo, kiu agis kiel sperta konsilisto.

La traduko estos dediĉita ĉe la Diservo en la Katedralo de S-ta Giles, Edinburgo, dum la XVIII-a Universala Kongreso de Esperanto. Be-daŭrinde pro la halto de laboro dum la ĝenerala striko en Britujo okazis tempoperdo, kiu malebligis, ke sufiĉe da ekzempleroj estus aĉeteblaj dum la Kongreso; sed oni povas mendi ekzemplerojn ĉe la British Esperanto-Association, Londono, aŭ ĉe iu agentejo de la Britaj Bibliaj Societoj tra la mondo.

—W.M.P.

*) Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono, Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj La Predikanto.

—El Esperanto.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — La ĉi tiea brodkast-stacio, IYA, nun elsendas lekciojn pri Esperanto. S-ro R. J. Crago liveris sian unuan paroladon dum septembro. Estas anoncita, ke paroladoj okazos regule ĉiusabato je la sepa kaj tridek vespere. Stacio IYA estas la tria Nov-Zelanda radiostacio brodkasti programerojn pri Esperanto.

La aferoj de la Remuera Klubo (kunvenejo 5 Aldred Road) bone progresas. Nune la disvastigo de Esperanto en tiu ĉi urbo estas iom malhelpata pro manko de lernolibroj. Tamen, la Auckland Esperanta Asocio, kiu ja kreskas, jam mendis librojn el Anglujo.

La ĉiusemajna ĵurnalo "The N.Z. Pictorial News" dum pasinta kvar-kvin monatoj publikigis Esperantajn lecionojn kun ŝajne bonaj rezultoj. Ĉiutage leteroj de personoj kiuj sekvas la kurson, atingas la gvidanton, kiuj leteroj klare montras ke troviĝas granda intereso.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO. —La kvina parolado pri Esperanto de s-ro W. H. King estis brodkastita de stacio 2YK dum 2a de septembro. La radiostacio estas helpanta bonege nian movadon en Wellington kaj provinco. Kvankam la stacio estas favorega ri-

late la enkondukon de regulaj lecionoj de Esperanto, kurso ankoraŭ ne estas aranĝita ĉar malfacilaĵoj devas esti unue flanken metitaj antaŭ ol oni povos komenci. Dume, ni esperu!

MELBURN. V.—Dum la pasinta monato, okazis en la programo por la Melburna Esperanto Societo, instruan recenzon de la Dua Ekzercaro de Dro. Zamenhof. S-ro C. W. Ballard, la parolinto, atentigis la anojn pri la diversaj rimarkindaĵoj en la dua Ekzercaro, kaj kontrastis la du verkojn.

Je 17a, — Pli multe da anoj ĉeestis kaj aŭdis la bonan elparolon de la lingvo per la fonografo. Alian nokton la anoj partoprenis tradukan rondon, kiu bone helpis ilin malpligi erarojn en la traduko kaj elparolo de ofte uzataj frazoj.

SYDNEY. — La lastmonate avisita disaŭdigado de semajna Esperanto-kurso de 2FC ne okazis laŭprograme. Anstataŭ komenci je la 15a septembro, ĝi komencis la 22an septembro, kaj la semajnon poste denove mankis pro anstataŭigo de grava longdistanca ĉiŝendo. Kvankam ĉagrenigaj, tiuj aliĝoj restas sole en la manoj de la radio-stacia administracio, kaj mal-kontentigitaj aŭdantoj, leginte la avizon en la "Suda Kruco" kaj atente atendante la lekciojn de S-ro Edmonds, nur povas plendi ĉe la stacio pro neplenumo de la originala sciigo. Oni nun avizas, ke la kurso daŭrigos seninterrompe de merkredo, la 13a oktobro; ĝis la 3a novembro ĉiam je 19.30 horo.

La alia Sydney radio-stacio, 2KY, disaŭdigante esperantan kurson, daŭrigas ĉiutage kun granda sukceso. Inter la ricevitaj leteroj estas kelkaj el Tasmanujo. La unua novaĵo pri la Universala Kongreso en Edinburgo atinganta Sydney-on estis disaŭdigita de tiu stacio.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

En la jaro 1912, sinjoro Francis Birtles faris sian unuan vojaĝon trans Aŭstralio per aŭtomobilo. Li skribis tre interesan rakonton pri tiu vojaĝo, kaj el la rakonto mi elektas la jenon:

—Se oni havas fidindan aŭtomobilon kaj se la vojoj estas bonaj ne estas eble plikomforte vojaĝi ol aŭtomobile, sed kiam la vojoj estas malbonaj... aŭ kiam tute mankas la vojo, estas plikomforte resti hejme.

—Mi jam sep fojojn vojaĝis trans Aŭstralio per biciklo, ĉiam aŭ diversaj direktoj, tial, kiam mi pripensadis

fari per aŭtomobilo pluan vojaĝon mi bone sciis la malfacilaĵojn, kiuj atendos min, kaj mi poste eltrovis, ke mi ne troigis ilin.

—Akompanis min sinjoro S. Ferguson kaj mia hundo "Rex." Ni lasis Fremantle per dekĉevalforta, unucilindra aŭtomobilo; ni devis multon porti kaj trovi spacon por abunda provizo da manĝaĵo, petrolo, oleo, hakiloj, ŝoveliloj kaj matoj.

La du unuajn tagojn venkante multajn malfacilaĵojn ni vojaĝis tra la sablaj ebenaĵoj, kiuj troviĝas oriente de York. Estis varmege, sed mankis al ni la tempo rimarki la varmecon, ĉar ni devis streĉi la sentojn por eviti la arbradikojn laŭ la tuta vojo ĝis Southern Cross (Suda Kruco). La proksiman tagon okazis la unuaj malfacilegoj; unue ĝi estis tre kruta monteto. Ni penis malsupren iri malrapidigante la aŭtomobilon per la haltigiloj, kaj kun la tuta pakajaĵaro ĉe unu flanko de la aŭtomobilo, por malhelpi renversiĝo. Ni trovis la monteton tro kruta; la aŭtomobilo pli kaj pli rapidis kaj ni faris la ceteron de la malsupreniro je terura rapideco. Sed tiu estis nur la komenco de la malfacilegoj de tiu tago. Kiam ni duone transiris sallagon la supro ekfendiĝis kaj la aŭtomobilo enprofundiĝis en koton ĝis la risortoj, ni metis la kokosajn matojn sub la radojn, sed la aŭtomobilo rapide subpremis ilin kelkojn futojn en la koton.

—Tiam ni devis forpreni ĉiujn pakajojn, por plimalpezigi la aŭtomobilo, kaj devis porti la pakajojn unu mejlon sur la dorso, al sabla altaĵo. Ni forigis la koton de ĉirkaŭ la radoj, sed ĝi estis tiel glueca, ke ni devis ĉiam forigi ĝin de sur la ŝovelilo ankaŭ, tial la laboro estis longa kaj laciga, kaj nur post penegoj ni povis movi la aŭtomobilon al ŝajne plibona loko, kie ĝi denove penis enkotigis sin. Dum kvin horoj en la varmegeco, ĝenataj de la salpolvo, kaj turmentataj de la muŝoj, ni daŭrigis la laboron ĝis frue posttagmeze, kiam ni fine forlasis la sallagon. Nia akvoprovizo preskaŭ elĉerpiĝis, kaj ni devis rezervi la malmulton, kiu restis al ni por la radiatoro.

Ni haltis ĉe kaveto, kie troviĝas akvo... sed ne por ripozi. La muŝoj estis netolereblaj, ili penis eniri en niajn okulojn, en niajn orelojn, en niajn vestojn, en la teon, kaj insistis ke ili estu parto el nia manĝaĵo. La hundo freneze saltadis kaj ekmordadis je la insektoj. Ni mortigis kaj

mortigis ĝis ni estis lacaj, kaj dormis pro laciĝo lasante la monstrojn la venkantoj. La proksiman tagon ni alvenis al Coolgardie; tie ni replenigis nian provizon kaj daŭrigis la veturadon al Norseman. La du proksimajn tagojn ni estis okupata evitante la sallagojn, ĉar post nia lasta sperto ni ĉiam zorge evitas ilin. Kiam ni atingis la montetaro Fraser, pluvegis. Sekve la proksiman tagon la aŭtomobilo kelkfoje enkotigis, kaj aliaj malfacilaĵoj estis ke kelkfoje ni devis trahaki arbojn, kiuj falis sur la vojon. Tiun tagon ni prezentigis al novaodoro. Ni renkontis aron de esplorantoj kiu uzas kamelojn. Tiu kiu ne konas la kamelon ne povas imagi la rafinitan odoron rezultantan el miksaĵo de kamelo kaj aŭtomobilo.

—Ni alvenis al Balladonia, enlanda telegrafstacio kaj lasis tiun lokon dum pluvego por iri al Eucla. La salarbetaj ebenaĵoj estis tre kotaj. La tero, kiu troviĝas sub akvo, estis la plej firma, ĉar ĝi ne fariĝas, kota ĝis ĝi ensorbiĝis de akvo, kaj dum la tuttago ni veturis tra la akvo. La proksiman tagon vento blovegis, kiu rapide sekigis la teron, kaj ni sen malfacilaĵoj atingis Eucla'n, kaj survoje por nin amuzi postkuris bestojn per la aŭtomobilo.

—Per la takimetro ni povis kalkuli la rapidecon de diversaj bestoj. Ni kalkulis, ke la dingo (indigena hundo) povas kuri 25 mejlojn en horo, kaj povas longe daŭrigi tiun rapidecon. Sovagaĵ hundoj kuras ĉirkaŭ 20 mejlojn en horo, sed ili estas lertaj je la evitarto kaj ne kuras rektlinie. Dromajo, kiun ni persekutis faris finkuregon po 30 mejloj en horo. Jen aliaj: Makropo 15 mejlojn en horo, kaj ili povas daŭrigi tiun rapidecon dum longa tempo. Kunikloj: por la unua cento da jardoj, ĉirkaŭ 18 mejlojn en horo; kiam kurante al sia kaŝejo distanco 400 jardojn ili malpli rapidas ĝis 12 mejloj en horo. Timego multe malpliigas tiun rapidecon, kiam ili devas kuri longan distancon. Lacerto kuras po 12 mejloj en horo por 20 jardojn. Blulanga lacerto: Ni ne povis atendi sufiĉe longe por bone eipruvi ĝian rapidecon, sed ni kalkulis, ke ĝi povas kuri unu mejlon en tago se ĝi havas la volon rapidi.

—Eucla estas ripettelegrafa stacio ĉe la suda marbordo de Okcidenta Aŭstralio, 10 mejlojn de la Suda Aŭstralio ŝtatlimo, ĝi estas unika vilaĝo subtenata de la Federala Registaro; la anaro konsistas el 6 viraj, hundo,

Ŝ kaprinoj, kaj kelkaj kameleoj. Kvan-kam la novaĵo de la mondo trairas ĝin ĉiutage, nenio tie okazas. La plej aĝa ano neniam vidis aŭtomobilon ĝis nia alveno.

—La veturado dum la ses sekvan-taj tagoj estis sen aventuroj. Las-ante Eucla'n ni grimpis kalŝtonajn montetojn kaj poste trapasis la ŝtat-limon de Suda Aŭstralio. Poste ni tra pasis kontraŭ bestetoj barilon, kiun konstruis la Sud-Aŭstalia Reg-istaro por malebligi ke la indiĝenaj hundoj kaj kunikloj atingu la mar-bordan teron.

—Kiam mankas la manĝaĵon la kunikloj venas el la nordo, kaj pereas milionope laŭ longe de tiu barilon. Ni plue iris laŭlonge de la transaŭs-tralia telegraflinio. Centoj da kaka-tuoj sin trovis sur la fadenoj. La proksiman tagon ni devis barakte iri tra la sablaj montetoj kaj devis mult-foje trahaki nian vojon tra la arbetoj kaj arboj. Sanktan vendredon, ni lavis niajn solajn pantalonojn en kaveto havanta ĉirkaŭ la grandecan kaj formon de sitelo. Ĉiam la indiĝ-enaj hundoj steliradis en la ĉirkaŭaĵo atendante ĝis ni lasis ilian akvoproviz-on. Indiĝena hundo kaŝe alprok-simiĝas al akvo, kiam ĝi estas sus-pektema. Unue ĝi alproksimiĝas al sendanĝera distanco kuŝiĝas, kaj atendas dum duonhoro. Tiam ĝi alproksimiĝas pluajn 50 jardojn kaj denove atendas, kaj same faras ĝis ĝi opinias, ke ĝi povas sendanĝere trinki. Se oni ilin surpafas ili forkuregas en ĉiun direkton; sed nur por denove reveni poste, kiam ili plitrans-kviliĝis. Ni daŭrigis la vojaĝon, kaj alvenis al Bathurst tre lacaj, ĉar ni devis ĉiam zorge observadi la vojon pro la multaj malhelpaĵoj, kaj 'a sek-vantan tagon ni atingis Sydney-on.

Kun koraj salutoj de P.H.

IT PAYS TO ADVERTISE.

An effective means of bringing Esperanto under the notice of the lis-

tening-in public has been adopted by a Sydney radio dealer. In a prominent position in his window, surrounded by wireless appliances of all description, is a display card reading:—

LISTEN IN!!

LEARN ESPERANTO

The International Auxiliary Lan-guage.

—
Tune in at 7.40 p.m. to
2KY on Tuesdays,
2FC on Wednesdays,
3LO on First Saturday
each month.

—
Hereunder the address of the local club is given together with the time of meeting—truly a compact and neat way of advertising to our mind. We commend it to others.

—
Melburna Esperanto-Societo, Presi-danto, s-ro C. W. Ballard; sekre-tariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Mel-bourne. Kunveneĵo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je ia oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kun-venas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 pm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezi-danto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobartia Esperanta Grupo. Kun-veneĵo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Mel-burno. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kun-veneĵo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.